# Unu tago en IZO



Certe, vi jam spertis tian emociegon kiu premas vian koron preskaù ĝis larmoj...
Jen tion, kion mi sentis kiam post tri jaroj, denove malfermiĝis antaù mi la pordo de Instituto Zamenhof.
Unue, klarigindas priskribi la ĉirkaùaĵon de Izo. Temas pri malriĉa kvartalo kie abundas polvo, malnovaj rompitaj kamionoj, forlasitaj plastikaĵoj..... La kaprinoj libere vagadas, vendistinoj sidas malantaù siaj varoj, varmas....

Subite, malantaù la pordo de Izo, ekvidiĝas freŝaĵo, ĝojo, vigleco. Tuj eblas forgesi la eksteran etoson por malkovri oazon de verdaĵo kaj de klereco. Jes, tuj, la freŝa verda farbaĵo, la nova tegmento, la novaj vitraj fenestroj memorigas al vi ke vi estas en aparta mondo.



Je nia alveno, la infanetoj de la ĵuskreita infanĝardeno sportumas vestitaj de sportkostumoj. Rose, la instruistino gvidas ilin, laùvice, raùpumi sur benko, salti sur ĝin portante kajeron sur kapo, aùskulti la informojn en la franca lingvo. Ili aĝas inter 2,5  kaj 5 jaroj, kaj hejme parolas la « evean » lingvon.
De longe la teamo de Izo deziris krei tian infanĝardenon. Nun, klasoj estis konstruitaj, kaj unu ĉambro akceptas ilin. Sed, la instruistaro atendas nin por proponi bele retskribitan tagprogramon.

De tiu momento, ni evoluas en Izo same kiel hejme, renkontante klasojn de la elementa nivelo al la lasta klaso de la kolegio.
En ĉiu klasĉambro, la instruistoj sindoneme kaptas la atenton de la infanoj. En la unua klaso de la elementa nivelo, « Ŝupet »klopodas aùdigi la francan lingvon. La gelernantoj aùskultas, ripetas, kantas, laùte deklamas poeziojn....eĉ dancas de temp'al tempo !
Kalkulado, legado, la tuta programo estas respektita, ĉiam el la ĉiutaga vivo de la infanoj.
Ni admiras la bele ornamitajn verdajn tabulojn, la desegnaĵojn, ĉie, la okuloj haltas sur belaĵo, sur plezuro. Ni imagu ke temas pri la sama influo sur la menso de la infanoj...

Tempo alvenas por ĉeesti la esperantan kurson, gvidata de Dzifa, filo de Koffi. Li kompreneble spertas pri la lingvo, kaj vere efikas, ĉar eblas esperantparoli kun la infanoj kiuj ĉion komprenas !
Ili lernas per la metodo 11 kun granda atento.
Sed forflugas la tempo, jen alvoko al la komputila ĉambro/ Apelete hodiaù lernigas geknabojn pri kiel elekti tabulon sur la komputilo, kiel aldoni koloron, kiel malaperigi ĝin. La duonklaso atentemas, kaj ne estas dubo pri ilia kapablo funkciigi komputilon majstre !
Rimarkindas ke iu pordo malfermiĝas al la apuda strato por ebligi homojn viziti la « komputilejon » ekster la klashoroj. Tiel la lernejo pova enspezi iom da mono.
Nun, la teamo kunigis la trian kaj kvaran klason en unu klasĉambro por interparoli. Temas pri gejunuloj, tre scivolemaj pri francio, pri ni, nia apogo, kiel, kie, kiam kiom....rondo de demandoj el ambaù flankoj ! La dialogoj disvolviĝas en libera kaj agrabla etoso, ĉiuj revante pri almenaù vojaĝo al eùropo. Ni kuraĝigas ilin bone labori por plibonigi la vivkondiĉojn surloke, ĉar la akcepto de afrikanoj en niaj landoj ne estas laùmoda nuntempe !
Tagmeze anoncas la disiĝon, tempo por foriri kaj nutri sin.
Dum plenkreskuloj agadas, ni profitas ke Koffi alvenis por sidi kunkune ĉirkaù la donacoj de niaj esperantaj francaj amikoj. Ni ĉefe citos la belan pakaĵon de K-Doj donacitaj de Floreal Martorell de Vinilkosmo, la multnombrajn kalendarojn transdonitaj de Marion kaj Kristof de EKC, kaj aldonos la infanlibrojn kaj diversaĵojn kiujn Sunkompanio donacis por la infanĝardeno.



Koffi akceptas prezenti sin kaj paroli pri la kreado de Izo kaj emocie dankas ĉiujn subtenantojn de Izo, akcentigante la serĉadon de rimedoj por la sendependeco de Izo en la estonteco.
Tre rapide, ni komprenas ke manĝo estis preparita por ni. Fakte temas pri bankedo ! Ni povas elekti ĉu bieron, ĉu dolĉaĵon por trinki, kaj post mirinda miksita salato, bongusta plado de iu semolo kun viandaĵo regalas nin.
Preskaù ĉiuj instruistoj ĉeestas, inkluzive du reprezentantoj de la gepatra asocio de gelernantoj.
Ĉiuj aprezas la pladojn silente, aùskultante la esperantan muzikon de Alejandro Cossavela.
Ni naĝas en universala etoso dank'al...esperanto !
Evidentiĝas ke la geinstruistoj deziras demandi nin pri multaj aferoj. Ni provas respondi kiel eble plej trafe, sciante ke magian bastoneton, ni ne havas, kaj ne respondecas pri la agadoj de niaj respektivaj ŝtatestraroj...
La interparolado disvolviĝas en interesa kaj amika etoso, eĉ se ni ŝatus plibabili por elesplori la malsamajn temojn. Ĉu vivo sufiĉus ?



Jam alvenas la unuaj knabinoj, muziko ekaùdiĝas, kaj danco sub niaj mirigitaj okuloj plezurigas nin, la dancistinoj montrante mirindan viglecon kaj gracion per siaj korpoj. Bela horo sekvita de invito al spektado de aparta sportludo : tĉukbal. La maĉo okazas en apuda tereno, kaj ĉiuj « izanoj » inter kiuj ni estas hodiaù, transportiĝas ĝis la ludejo. La knaboj trejniĝas, kaj baldaù la fajfilo stridas, anoncas la komencon de la ludo. Du teamoj : teamo « esperanto » kaj teamo « institut zamenhof » alfrontiĝas, sen perforto, sen vundo, en pacemaj rilatoj.
Ĉiuj gajnas, la ĝojo devenas de la ludmaniero.





Ni trankvile revenas lernejen por partopreni la alfabetigan kurson por plenkreskuloj. Delonge la Iz-gvidantoj planis tian kurson, kaj de tiu-ĉi jaro, temas pri 35 homoj en la unua elementa klaso, kaj dekaro en la dua nivelo. Vere, ni estis kortuŝitaj vidi tiujn patrinojn (ĉefe virinoj ĉeestas) post laborema tago, strebante lerni, ripeti la francan lingvon kiun ili neniam lernis.



Ili fieras instruiĝi por kompreni siajn idojn, siajn edzojn. Ni kuraĝigis ilin kore, kaj ili kantis kaj dancis por danki nin.... Noktumas sur la kvartelo Be-Kpota de Lome. Nia koro ŝveliĝas per emocio : de la plej juna al la plej aĝa, Izo garantias mensmalfermon al ĉiuj, kaj tion, ni fieras subteni.

